

Etna kaj interkultura komunikado

*Homoj kapablas
vivi kun diferencoj..*

*“Ni ĉiuj havas jam
diversajn identecojn : vi
venas el iu regiono,
ricevis iun edukadon,
apartenas aŭ ne
apartenas al iu religio,
ktp. Via kulturo estas
ĉiam multope, miksaĵo de
diversaj aferoj. Kiel
migranto vi havas krom
vian originan kulturon
ankaŭ novan. Sed ĉar
nuntempe ekzistas la ideo
ke kulturoj kontraŭstaras
unu la aliajn, la hibrideco
ne estas akceptata. Via
fono gravas por via
identeco, por ki uvi estas
kaj tion vi bone povas
kombini kun via nova
kulturo”.*

Inter kulturo kaj komunikado ekzistas interrilato. Kulturo ne nur informas homojn pri la reala mondo en kiu ili vivas, ĝi programas ankaŭ la manieron laŭ kiu informoj estas pretigitaj en la homa konduto. Kulturo estas komunikado kaj komunikado estas kulturo.

Ĉe interkultura komunikado la kulturaj ecoj de pluraj etnaj grupoj estas prikonsiderataj. Estas eksplicita atento pri lingvo, normoj, valoroj, kutimoj, ritoj, praktikoj, konceptoj..., sed ankaŭ por ne-parolaj simboloj kaj komunikada stilo. Signifo kaj interpretado de la mesaĝo baziĝas sur interkonsentoj en certa grupo.

Kiam sendinto ja scias la lingvon sed ne la ne-esprimitajn kodojn kaj la regulojn kiuj validas ene de la grupo, tiam li restas eksterulo. Ties mesaĝo tiam sendube povas esti interpretata neĝuste, aspekti nekompreneble aŭ konduki al konfliktoj. Ju pli malgranda la diferenco en interpretado inter la sendinto kaj ricevinto, despli granda la ŝanco ke la signifo tute kongruas.